



ESPERANTO

NORMANDA BULTENO

unuigo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 50 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

POST FERIOJ.....

Mi esperas ke ĉiuj legantoj de Normanda Bulteno bone profitis somerajn feriojn, ĉu ripozante, ĉu turismante, ĉu parolante Esperanton kun alilandaj samideanoj, ĉu kongresante ĉu partoprenante aliajn esperantistajn aranĝojn...ktp.

Ne ĉiam ferioj daŭras (eĉ por emeritoj) Profesiaj kaj hejmaj taskoj, asociaj kaj klubaj aktivaĵoj postulas kaj foruzas nian tempon kaj nian energion. Komenciĝas nova ag-jaro. Inter niaj okupoj, Esperanto havu ĉefan pozicion ĉar aktivuloj ne estas sufiĉe multaj en nia movado.

Kiel redaktoro de tiu bulteno, mi esperis ricevi raportojn kaj artikolojn pri viaj someraj vojaĝoj; mi atendis komunikojn pri estontaj aktivaĵoj de viaj grupoj sed ve ! malmulton vi sendis. Ne hezitu sendi tekstojn, ĉu esperantlingvajn, ĉu franclingvajn; mi korektos viajn lingvajn erarojn se necese.

Ni ofte plendas ke gejunuloj ne interesiĝas pri Esperanto. Tio ne plu ĝustas. Junuloj de JEFO tre aktivas kaj ili estas organizantaj "Poman Semajnofinon" de la 27a ĝis la 29a de Oktobro en Pont d'Ouilly (Calvados). Ĉiuj Normandoj (eĉ maljunaj) estas invitataj. Tiu evento estos la starto de niaj agadoj en nia provinco. Subtenu la gejunulojn partoprenante tiun renkontiĝon. Vi trovos informojn kaj aliĝilon en tiu bulteno; ne atendu por aliĝi. Ni deziras bonan sukceson por tiu festo, esperante ke la vetero ne estos normanda ! JEFO kutimas organizi tiajn Semajnofinojn kun gastronomia motivo (krespa, fromaĝa, vina...) en ĉiuj regionoj de Francio. Se vi ne povos partopreni la tutan aranĝon, venu viziti niajn junulojn, ĉu sabate, ĉu dimanĉe sed vi aliĝu por la komuna manĝo. Kontaktu Yves Bachimont en Caen.

Mi atentigas vin ankaŭ pri la ago-tago por Esperanto: La 7a de Oktobro! Dum tiu tago, ĉiuj esperantistoj en la mondo devos klopodi por informi pri nia afero : manifestacioj, leteroj al politikistoj, disdono de flugfolioj, ekspozicioj, ktp... Bonan kuraĝon !

Petro KIJŬ

NOS AMIS DE BASSE SAXE

Vous savez que notre province est jumelée avec la Basse Saxe (région de Hanovre) Nos amis allemands sont très désireux d'avoir des relations amicales avec les espérantistes normands. Depuis quelques années, des relations existent entre les dirigeants de nos deux associations, soit par lettres, soit par messages Internet, soit par téléphone, soit par échange de nos bulletins. Il faut maintenant envisager des relations plus étendues à l'ensemble de nos adhérents : visites, envoi de délégations, correspondance... Nos amis éditent le bulletin: "Harca Esperanto Kuriero" Harz est une région de moyenne montagne (1142 m au Brocken), très touristique. C'est dans le Harz que les légendes allemandes placent la célébration de la nuit de Walpurgis. Ils éditent également "Esperanto in Niedersachsen". Vous trouverez ci dessous quelques articles parus dans leur bulletin:

Kial do Esperanton ?

Post la milito, mi estis tiom feliĉa reveni jam dum aŭgusto 1945 hejmen. Tiutempe mi havis la aĝon de 22 jaroj kaj la firman konvinkon ke ĉiuj homoj kaj ĉefe la junuloj havus la taskon ĉion fari por estonte eviti tiajn terurajn okazintaĵojn kiel la lastan militon.

De mia patro, kiu jam dum la 20-aj jaroj lernis kaj uzis esperanton, mi aŭdis pri tiu lingvo kaj ĉe mi kreskis la konvinko ke ĝi povus esti taŭga ilo por solvi tiun taskon. Mi tiamtempe jam aktivis en junularaj rondoj kaj nun ankoraŭ krome komencis lerni tiun lingvon.

Dum la nun tre malrapide komenciĝintaj provoj de malgrandaj internaciaj renkontiĝoj de la junularmovadoj, en kiuj mi partoprenis mi konstatis sufiĉe grandajn diferencojn inter la esperantistaj kaj neesperantistaj renkontiĝoj. Ĉe la lastaj mi konstatis, ke preskaŭ ĉiam la naciaj grupoj restis inter si, ĉefe dum la liberaj aranĝoj kiel ekzemple ekskursoj, manĝotempoj aŭ dum la liberaj vesperoj. Personaj kontaktoj inter ili okazis nur tre tre malofte. Tute kontraŭe estis dum la esperantistaj kunvenoj. Oni serĉis tiujn kontaktojn kaj tio ofte estis ankaŭ sukcesplena, kvankam tio ankaŭ estis kelkfoje iom streĉa. Sed ĉar ja ĉiu uzis lingvon, kiun li aŭ ŝi devis lerni antaŭe, kaj kiu ne estis ilia gepatra lingvo, la malfacilaĵoj por ĉiuj estis samaj. Eraroj ne tiom gravas kaj la kontaktoj komencis kreski kaj eĉ ankaŭ ripetiĝis post ioma tempo dum venontaj renkontiĝoj kaj ofte ili ankaŭ restis dum longa tempo.

Mi porekzemple ankoraŭ nun havas kontakton kun geamikoj kiujn mi trovis dum la unuaj jaroj post la milito je tiaj kunvenoj.

Tiuj personaj kontaktoj ŝajnis kaj ŝajnas al mi tre gravaj ja eĉ necesaj se oni celas la interamikigon de la popoloj.

Ĉu tio efektiviĝos per unu aŭ per multe da lingvoj, tio estas demando de la kapableco kaj tempo de tiuj kiuj volas efektiviĝi tiun ideon.

Friedel BUES 24.4.2000

VIZITO en NORMANDIO

Jam de kelka tempo EMAS havas ĝemelajn rilatojn kun Esperanto-asocio en la franca regiono Normandio. Ĝis nun tiuj rilatoj limigis sin je nuraj poŝtaj kaj telefonaj kontaktoj flanke de kelkaj anoj de ambaŭ asocioj. Tial dum malgranda kunveno de la pliampleksita estraro de EMAS en Hildesheim estiĝis la ideo ŝanĝi tiun situacion kaj plani la unuan viziton de EMAS-anoj en Normandio. Ebla dato por tia aranĝo estus ĉirkaŭ Pasko (15.4.2001) venontjare. Kion vi pensas pri tiu ideo?.....

Se anonciĝos sufiĉe da interesiĝantoj por tiu planita vizito ni tuj kontaktiĝos kun niaj normandaj samideanoj por peti ilin proponi tranoktlokojn kaj prepari vizitprogramon por ni. Tiukaze sekvos pluaj informoj pri necesaj detaloj

Gerhard WEBER

Weber.Esperanto@t-online.de

La estraro de U.N.E. plezure pristudos tiun projekton

RUSINO VIZITOS NIN

Ĉu vi memoras Barbara CVETKOVA el Sankt-Peterburgo ? Ŝi vizitis nin antaŭ kelkaj jaroj kaj ŝi travojaĝis Normandion kaj Francion. De tiam ŝi mortis kaj ni anoncis ŝian forpason en nia bulteno.

Dum la SAT kongreso, ĉi-jare en Moskvo, mi renkontis ŝian filinon Valerija kiu estas ankaŭ tre fervora esperantistino. Ŝi esperas viziti Francion dum printempo 2001

ASSEMBLEE GENERALE de U.N.E. et de la Fédération.

En 2000, nos réunions statutaires ont eu lieu à Rouen. Quand aura lieu l'A.G. 2001 ? Quel groupe ou quel membre actif l'organisera ? Que les volontaires veuillent bien contacter notre Président: Yves NICOLAS 17/37 Quartier du Bois 14200 Hérouville Saint Clair Tél. 02 31 95 11 81 yvanmi@club-internet.fr

Le TRESORIER:

Tous les adhérents n'ont pas encore réglé leur cotisation pour l'année 2000. Evitez moi de vous envoyer des rappels

Le BULLETIN : Je désire cesser mes activités de rédacteur du bulletin et de trésorier que j'assume depuis de nombreuses années. Que les volontaires se fassent connaître auprès du Président

NIA VIVO EN:

Grand Quevilly: Les réunions hebdomadaires reprendront tous les jeudis de 17h45 à 19h45 au Centre Socio-Culturel à partir du 5 Octobre 2000.

KONGRESOJ EN 2001

SAT AMIKARO: du 14 au 17 Avril à Chambéry

Nacia Kongreso de ESPERANTO FRANCE : du 2 au 4 Juin à Limoges

SAT : du 14 au 20 Juillet à Nagykanizsa (Hongrie) près du lac Balaton et de la frontière croate

UNIVERSALA KONGRESO du 21 au 28 Juillet à Zagreb (Croatie)

Internacia Junulara Kongreso (TEJO) du 29 Juillet au 5 Aout à Strasbourg

ANEKDOTOJ EL MALNOVA GREKIO

En malnova Grekio, la spartanoj estis famaj, interalie pro ilia vortoŝparemo. (Ni memoru ke nia esperanta vorto "lakonismo" fontas de tiu emo de la loĝantoj de Sparto al ekstrema koncizeco: fakte, ilia regiono nomiĝis "Lakonio").

Jen 2 aŭtentikaj anekdotoj kiuj respegulas tiun tendencon de la spartanoj al vortoŝparo:

a) Iam Sparto estas atakita de nombre tre supera malamiko; la estro de tiu-ĉi sendas al la spartanoj mesaĝon kiu diras: "Tuj kapitulacu, kaj ni kompatos vin; sed se ni prenas vian urbon post batalo, ni ĝin detruos ĝisfunde."

La respondo estis: "SE".

b) Eta sparta taĉmento iam estis encirkligita de grandega malamika armeo; al ĝi sendita mesaĝo proponas: "Kapitulacu, ĉar niaj sagoj tiom nombras ke ili kaŝos al vi la sunon."

La respondo estis: "Ni enombre batalos."

XXXXXXXXXXXX

La nacia manĝo de la spartanoj estis la fama "nigra brodo" (le brouet noir) bone konata de la legintoj de "Asteriks la Gaŭlo en Grekio". Iam, Dioniso, la tirano de la greka civito Sirakuzo en Sicilo, volis gustumi tiun manĝon kies reputacio ne estis tre favora, ĉar temis pri senspica miksaĵo de verdaj kaj sekaj legomoj kaj de porkosango. Li ordonis al sia kuiristo pretigi da ĝi laŭ la strikta recepto. Tion farite, li gustumis kaj diris: - Malbonegas!

- Nemirige, diris la kuiristo, ĉar mankas la 2 neanstataŭigeblaj personaj kondimentoj, tio estas ŝvito kaj laceco, pro laboro, ĉasado, sporta kaj armila ekzercado...

H. Rousseau (el Mathieu 14)

L'Approche

"Vous m'aimez donc vraiment?" lui demanda-t-il. Elle hésita avant de répondre. Elle se maria avec un autre, eut un enfant, se lassa, divorça. Ensuite, elle se tourna vers lui: "Oui, répondit-elle, Pourquoi?"

Jacques Sternberg (Histoires à dormir sans vous)

L'Alproksmiĝo

"Ĉu vere vi amas min?" al ŝi demandis li. Ŝi hezitis antaŭ ol respondi. Ŝi edziniĝis kun alia, naskis infanon tediĝis, eksedziniĝis. Poste ŝi sin direktis al li: "Jes, ŝi respondis, kial?"

Tradukis: Gérard Lecarpentier el Carentan (Manche)

Mondekspozicio "EXPO 2000" en Hannover Malsupre Sakcio

Raporto de Klaus Schlüter en Laatzen

En la somero 2000, Malsupra Sakcio estas la kultura centro de la mondo, almenaŭ de Eŭropo. Ĉar en Hannover okazas la mondekspozicio - la unua en la 150jara historio de mondekspozicioj, kiu estas aranĝita en Germanio. Ĝi havas similan signifon kiel la mondekspozicio en Parizo de 1889 kiu donacis al Francio la Eiffel-turon. Francio gastigis tian ekspozicion jam 6foje dum Germanio aranĝas ĝin nunjare je la unua fojo.

Ĉar mi loĝas en Laatzen (ĝemela urbo de Grand Quevilly) kiu situas direkte antaŭ la pordoj de la ekspozicio, mi vizitas la vastan terenon preskaŭ ĉiutage kaj tamen ne sukcesos vidi ĉion ! 180 nacioj montras prezentaĵojn el sia vivo. Triono el ili havas propran pavilionon sur la tereno, inter ili kompreneble ankaŭ Francio; la aliaj partigas inter si grandajn halojn kiuj, en aliaj jaroj estas uzataj por la industria foiro de Hannover. Ĉiuj uzas la plej modernajn kaj eksterordinarajn arkitekturojn. Ekzemple Nederlando, kiu kutimas kontentiĝi kun malvasta tereno en sia lando, konstruis 6 etaĝojn el malsamaj pejzaĝoj unu super la alia, 40 metrojn altaj : en la 4a etaĝo troviĝas arbaro en la 5a lago ! Japanio erktis domegon el - vi ne kredos-papero. Danlando kunigis piramidon, duonkuglon kaj kubon. La venezuela reprezentas floregon-la tegmento estas petaloj kiuj sin fermas verpere.

Ankaŭ la germana, kompreneble, estas interesa. Enirante, vi vidas centojn da blankaj skulpturoj de germanoj kiuj kontribuis al scienco aŭ ekonomio. En la 2a sektoro, vi staros sur 3 pontoj -3,5 kaj 8 metrojn super la planko kaj de ili vi vidos grandegajn ekranojn sur ĉiuj muroj (kaj sur la planko), montrantaj filmon el ĉiutaga vivo en Berlino. La 3a sektoro montras 16 apartajn ekspoziciojn el la 16 federaciaj landoj germanaj. Malsupra Sakcio elektis kiel ekspoziciaĵo la originalon de unu el la unuaj Volkswagen skarabo-aŭtoj, kiuj ja venas el Wolfsburg Malsupra Sakcio.

La nacioj estas nur parto de la ekspozicio,- krome estas tie la Parko de Temoj, kiu montras en 6 haloj vizion de la vivo en la estonteco, sub la subtemoj homo, naturo, tekniko -, la moto de tiu Mondekspozicio. Ĉiuvespere okazas granda lumofesto,- super lago estas videbla spektaklo el Lazer-radioj, muziko, teatraĵo, cirkajoj kaj fine pirotekniko. Ankaŭ la kulturo ludas grandan rolon. Meze en la tereno, oni konstruis teatro-kaj muzikhalon. "Preussag Arena" kun 14.000 sidlokoj, kie okazas preskaŭ ĉiutage iuj grandaj koncertoj kaj prezentaĵoj ; krome 2 teatrojn, la pli granda kun 1500 sidlokoj, kaj ankaŭ en la urbo Hannover kaj apudaj urboj kaj urbetoj daŭre estas festivaloj de danco, kino, muziko kaj teatro. Vizitantoj,-oni atendas 20 milionojn, optimistoj parolas pri 40 milionoj,- devas certe resti kelkajn tagojn por nur vidi parton de la vidindaĵoj. Sed Hannover estas bone preparita,- oni malfermis multajn parte luksajn, parte modestajn hotelojn, konstruis novan tramlinion (kiu veturas al la centro ĉiujn 3 minutojn) kaj krome novan fervojon kiu konektas la flughavenon, la centron kaj la ekspozicion. Nova stacidomo por ultrarapid trajnoj (ICE komparebla al TGV) estiĝis rekte ĉe la enirejo de la ekspozicio.

Inter la vizitantoj, kredeble, troviĝas multaj esperantistoj, kvankam plej ofte ili ne estas rekoneblaj. Tamen ni jam renkontis ankaŭ francajn esperantistojn. La Mondekspozicio komencis la 1an de Junio kaj daŭros ĝis 31a de Oktobro 2000.

+++++

Ni ne scias kiom da normandaj esperantistoj vizitis la Mondekspozicion. Ŝajnas ke la informiloj ne sufiĉe informis pri la evento. Venis malpli da vizitantoj ol antaŭvidite. Kiu kulpas pri tio ?

La Filature

Amorale, elle l'avait toujours été d'instinct. Infidèle aussi, cela coulait de source puisqu'elle était fort séduisante et passablement excitable. Et bien entendu, elle avait beaucoup d'amants concentrés dans le même espace-temps, autant d'hommes qu'elle ménageait à coup de mensonges plus ou moins habiles.

Mais elle s'empêtrait si souvent dans son propre labyrinthe de duplicité qu'elle avait engagé un détective privé pour la prendre en filature et lui dire le lendemain matin ce qu'elle avait fait de son temps la veille.

LA SEKVADO

Senmorala, ŝi ĉiam estis instinkte vivinta, ankaŭ malfidela. Estis tre kompreneble ĉar ŝi estis tre alloga kaj ekscitebla. Sekve, samtempe, ŝi havis multajn amorantojn kiujn ŝi domaĝis per pli aŭ malpli spertaj mensogoj

Sed ŝi tiom ofte implikiĝis en sian trompemplabirinton ke ŝi estis dunginta privatan detektivon por ke li sekvu ŝin kaj diru al ŝi, la matenmorgaŭon, ŝiajn hieraŭajn agadojn.

Texte de J.Sternberg traduit par Gérard Lecarpentier de Carenta

POMA

-Semajnfino

27-29 oktobro 2000 • Caen




En Pont d'Ouilly, ĉarma urbeto 40 km sude de Caen, okazos la Poma Semajnfino, fine de oktobro kaj ĝuste akurate dum la pomrikoltoj. Vi nepre ne maltrafu tiun eventon, ĉar unuflanke unuafoje kuirada semajnfino (KS) estas finfine organizita en Normandio, sed aliflanke ĝi certe estos la plej romantika el la jam okazintaj KS.

Efektive, la partoprenontoj povos ne nur milde kaj tenere mordeti diverskolorajn normandajn pomojn, sed ankaŭ ĝui la ĉirkaŭaĵojn de la gastejo, kiu troviĝas meze de Svisa Normandio (monteta kaj arbara parto de Normandio), laŭborde de trankvila, flustre fluanta rivereto. Krom manĝi pomojn,




dum tiu semajnfino vi povos ankaŭ memkuiro kelkajn normandajn receptojn, frandi normandajn fromaĝojn, cidrojn... ekskursi piede, kajake, bicikle (se vi kunportos propran), aŭte tra la apudaj montetoj, malpli altaj ol la svisaj, sed tamen indaj. Ni ankaŭ planas por vi viziton al pom-foiro aŭ/kaj al cidrejo, kaj kelkajn aliajn surprizojn. Do, bonvenon en Normandio, kaj rapide aliĝu, ĉar ne estos sufiĉe da litoj por ĉiuj !...



La Kuiradaj Semajnfinoj de Jeŝo

ALIĜU HODIAŬ!

- Antaŭpago: 50 FRF / 7,62 EUR. Eksterlandanoj pagos surloke por ŝpari bankokostojn. Por Francoj, aliĝo validas nur post ricevo de antaŭpago. Ĉiukaze vi nur povos certi pri via partoprenado post esti ricevinta konfirmon de ni!
- Se vi malaliĝas 15 tagojn antaŭe, vi ricevas vian (antaŭ)pagon minus 50 FRF / 7,62 EUR. Post tiu dato, la kotizo ne estos repagebla.
- La baza kotizo inkluzivas tri manĝojn tage kaj du tranoktojn, de vendreda vespermanĝo ĝis dimanĉa tagmanĝo.
- Via aliĝo estas transdonebla al alia persono, se vi skribe anoncas tion. Ni alĝustigos la kotizon, kiu ne povas malaltiĝi.
- La nombro de litoj estas limigita: tuja kaj frua aliĝo certigas do ĉeeston.
- La duan informilon vi ricevos 15 tagojn antaŭe.



En la normanda...

No vous invite tous à notre week-end pommes à Pont d'Ouilly, du 27 au 29 d'octobre. Les siens qui pourront v'ni auront bi tché s'ot-chuper : tcheusène, dégustation, bacouettage su bié des choses (gastronomie, échange, tchulture nourmande...). No z'invite tout, comme de juste, les horsains qui prèchent en esperanto ; coume cha no pourra tous passer du bouon temps en parlant notre chère langue internationale.



Viajn aliĝilon kaj (antaŭ)pagon vi sendu al:

Yves Bachimont - 106 rue d'Orléans - 14000 Caen

Tel. + 33 (0)2 31 75 15 74

Retadreso: YBachimont@esperanto.org

Aliĝilo al la POMA - Semajnfino

Familia nomo : _____ Persona nomo : _____

Adreso : _____

_____ Lando : _____

Naskiĝdato (TT-MM-JJ) _____ () ina () malina () mi estas vegetaran-in-o

Telefono : _____ Telefakso : _____

Retadreso : _____ Profesio: _____

- | | |
|---|----------------------------|
| () baza kotizo | 249,26 FRF / 38 eŭroj |
| () rabato (studento, senlaborulo) | - 49,20 FRF / - 7,50 eŭroj |
| () se vi loĝas ekster Francio, duonpreze de la ĉi-supra kalkulita kotizo ! | |
| () se vi estas pli ol 30 jaroj, aldonu | + 49,20 FRF / + 7,50 eŭroj |
| () se vi aliĝas post la 29a de septembro, aldonu | + 49,20 FRF / + 7,50 eŭroj |
| () mi manĝos sen tranokti surloke : ĉiu manĝo | 49,20 FRF / 7,50 eŭroj |
| (Rezervado de manĝo(j):) | |

SUMO :

Mi antaŭpagas : () per kunsendita ĉeko je la nomo de *Espéranto-Jeunes*

() mi ne antaŭpagas, ĉar mi ne loĝas en Francio

() Mi proponas _____ sidloko(j)n en mia veturilo

() Mi bezonas sidlokon en veturilo el _____

Dato :

Subskribo :

